

## "La aristokrataj burĝinoj" de F. Dancourt Komedio - idea kaj arta originaleco

Ljudmila MURSALIJEVA (RU)

F. Dancourt (Dankur), unu el plej talentaj komediverkistoj de la fino de la XVII-a - komenco de la XVIII-a jarcento, pentris en siaj verkoj satirecan morbidon de sia epoko. Kiel multaj liaj samtempuloj, li tre alte taksis la verkaron de *Molière*, studis la arton de komediverkado pere de liaj verkoj. En sia teatraĵo "La aristokrataj burĝinoj" li evoluigas siamaniere la problemaron de "La mokindaj preciozulinoj" kaj de "La nobela burĝo" de *Molière*. La komedio de *Molière* "La mokindaj preciozulinoj" celas primoki la strebon de junaj burĝinoj iĝi nobelulinoj, sed la teatraĵo celas same ridindigi kelkajn aspektojn de precioza kulturo, kiu estis siaspeca formo de aristokrata kulturo. *Dancourt* en sia verko nenion diras pri la precioza kulturo, sed liaj protagonistinoj same kiel en "La mokindaj preciozulinoj" celas el la burĝa tavolo penetri en la nobelaron kaj ili strebas imiti la nobelaran vivmanieron.

En la komedio de *Dancourt* (1) estas kvar personoj, obseditaj de gloramado kaj de pasio por altaj titoloj: riĉa vidvino de juĝoficisto sinjorino *La Grefier* (ŝia nomo signifas "tribunalsekretaria edzino"); ŝia fratino sinjorino *Blandineau* (ŝia edzo estas prokuroro en *Châtelet*); ilia kuzino sinjorino l'Elue (ŝia nomo signifas "elektita, elstara, alvokita") kaj sinjorino *Carmin* (ŝia nomo signifas karmezina), lanvendistino. La temo de aĉeto-vendo de postenoj kaj titoloj ludas grandan rolon, ĝi estas firme ligita kun la temo de pasio por nobeltitoloj. *Molière* ne tuŝis tiun temon. En la verko de *Dancourt* tiu temo penetras la tutan teatraĵon kaj tuŝas ĉiujn menciitajn personojn.

La teatraĵo enhavas tri aktojn, ĝi estas verkita en prozo. La eventoj okazas en la vilaĝo Brie, en la eksterurba prokurora domo.

La konflikto baziĝas sur la intenco de reĝa prokuroro sinjoro *Naquart* geedziĝi kun la sinjorino *La Grefier*. Kvankam li scias ke *La Grefier* estas obsedita pri la ideo penetri en la aristokratan

socion. Post la morto de sia edzo ŝi vendas la juĝsekretarian postenon, ŝi "puriĝas" de burĝeco, iĝas "ekzamenŝtono" (I,3) por estonta supreniro sur la socia ŝtuparo. Ŝi rifuzas la geedziĝon kun sinjoro *Naquart* pro lia nealta origino.

La glorama sinjorino *La Grefier* estas naiva kaj stulta. Ŝi planas geedziĝi kun juna grafo, iĝi grafino. "Sed tio estas nur komenco: de unu edzo al la alia ... mi preparos por mi la vojon ... kaj kiel eble pli rapide" (II,3).

Ŝi revas havi multajn servistojn, robon kun trenejo, riĉan kaleŝon. Kiam ŝia servistino mencias, ke la grafo amas ŝian junan nevinon *Angélique*, la vidvino memfide respondas: "La junulo nure ŝajnigas tion por proksimiĝi al mi" (II,4). Ŝi diras, ke li amas ŝin, sed lia amo estas kaŝita kaj mistera, kaj li revas kaŝe forveturigi ŝin, sciante deantaŭe pri ŝia konsento.

Kvankam la sinjorino *La Grefier* nur intencas iĝi aristokratino, ŝi jam volas apartiĝi de ŝiaj proksimumoj: ŝi opinias, ke ilia burĝa stato malhelpas al ŝi plialtiĝi, ŝi nomas ilin "ridindaj burĝinetoj" (II,9).

La fratino de *La Grefier*, sinjorino *Blandineau* havas la saman pasion. Jen ĉi tie ni vidas la originalan verkmanieron de *Dancourt*: li ne kreas unusolan "koncentritan" personon, obseditan de tiu pasio, sed li distribuas la trajtojn de tiu persono al pluraj rolantoj. La sinjorino *Blandineau* havas la saman pasion, sed ĝi manifestiĝas alimaniere. Ŝi amegas lukson, hazardludojn, ŝi elspezas la monon sen kalkuli ĝin, ŝi kunvenigas en sia eksterurba domo spritajn virinojn, homojn de alta socio, junulojn kun bonaj manieroj, ili ĉiuj formas "agrablan societeton por plezuro kaj riĉaj bankedoj, hazardludoj estas la animo de tiuj kunvenoj" (I,6). Ŝi ŝatas same "violonojn, muzikon, koncertetojn, balojn, operon" (I,9), aregon da kandeloj en salono, puran manĝilaron ... Sinjorino *Blandineau* portas robojn kun trenejo, por "malsimili je plebo!" (I,8). Ŝi revas pri nobeltitolo.

Por kontentigi sian edzinon, sinjoro *Blandineau* vendas sian postenon por 40 000 frankoj kaj aĉetas la titolon kaj la nomon de barono de *Boitortu*. Lia feliĉa edzino iĝas baronino de *Boitortu*.

Ilia kuzino sinjorino l'Elue ne povas akcepti, ke ŝi restos en la



burga medio, kiam ŝiaj fratinoj iĝos nobelinoj. Ŝi ne povas elteni tiun humiligon kaj pretas divorci, se ŝia edzo ne akiros nobelan titolon. (II,7). En tiu persono la aŭtoro substrekas la jaluzon, malbonkorecon, tro altan ideon pri si mem. Ŝi ne povas elteni, ke ŝiaj egalulinoj "plialtiĝas", kaj ŝi faros ĉion eblan por egaliĝi kun ili.

Pli detale estas perlaborita la persono de sinjorino *Carmin*, lanvendistino. Same ŝi volegas iĝi nobelino. Ŝi decidis forlasi sian komercon kaj aĉeti al sia edzo la postenon de juĝprezidanto en malgranda urbeto, ĉar tio "donas privilegiojn kaj grandan povon" (II,5). Ŝia edzo iĝas absoluta mastro en tiu sfero. Nun en la tribunalo estas nek prokuroroj, nek advokatoj, nek konsilantaro. Kaj sinjoro prezidanto povas vanti, ke li mem estas la tuta justico" (II,5). La sinjorino *Blandineau* rimarkas sarkasmece, ke la sinjoro *Carmin* scias nek latinan lingvon, nek juĝpraktikon, kaj, eble, li eĉ ne kapablas legi kaj skribi (II,5). La sinjorino *Carmin* respondas trankvile, ke jam sufiĉas, ke li scipovas rapide subskribi, kaj la tutan juĝproceduron faros anstataŭ li iu loka juĝisto por 30-40 frankoj jare. Kaj ĝenerale tiuj detaloj ne tuŝas ŝin, ŝia celo estas penetri en la altan socion. Ŝi revas lasi sian edzon en provinco, ke li faru siajn aferojn kiel li povas. Kaj ŝi brilos en Parizo, en alta socio, kiel juĝprezidanta edzino.

La intrigo de la teatraĵo komplikiĝas pro la fakto, ke la juna grafo, kiun sinjorino *La Grefier* elektis por geedziĝi kun li, amas ŝian junan nevion *Angélique*. Sed *Angélique* ne estas riĉa. Interese estas noti, ke *Dancourt* ne donis nomon al la grafo, verŝajne por substreki la tipecon de tiu persono. La grafo ege realece juĝas sian pozicion. Por li la geedziĝo kun riĉa vidvino estas "savo de malriĉeco" (III,4). Li diras tute senkaŝe: "Ŝi estas mia sorto: ŝi havas renton, domojn, 20 000 frankojn de kontanta mono, mi posedos ĉion tion, mi okupiĝos pri aferoj" (III,4). La prokuroro *Naquart* surprize demandas: "Kun via nobeleco vi okupiĝos pri aferoj?" La grafo respondas: "Kial do ne? Aferistoj aĉetas niajn terojn, alproprigas niajn titolojn kaj nomojn, kion do vi vidas malbonan, se ni same okupiĝos pri aferoj por reveni en niajn proprajn domojn kaj en nian propran socian staton" (III,4). La

grafo komprenas, ke pro sia malriĉeco li ne povas feliĉigi *Angélique*, kaj kiam la riĉa vidvino vokas lin, li senhezite kuras al ŝi kun etenditaj brakoj.

Sed same la sinjoro *Naquart* volas geedziĝi kun la vidvino. Pro tio li decidas helpi la geedziĝon de la grafo kaj *Angélique*. Li preparas ĉe vilaĝa notario du geedziĝkontraktojn: en la unua estas la nomoj de grafo kaj *Angélique*, en la alia lia nomo kaj la nomo de la vidvino. La vidvino subskribas la kontrakton sen legi ĝin, ŝi pensas, ke ĝi estas la kontrakto de ŝia geedziĝo kun la grafo. Kiam la trompo estas malkovrita, *Naquart* ŝin trankviligas: "La tero de grafo apartenas al mi, mi redonos ĝin al li post mia morto, mi testamentos al li la tutan mian riĉaĵon. Kaj vi testamentos ĉion al via nevino. Kaj ili kun plezuro cedos al vi la grafan titolon, pri kiu vi revas" (III,11).

Do, *Naquart* iĝas grafo, kaj sinjorino *La Grefier* estas feliĉa, ĉar ŝi ekhavis tamen la edzon-grafon. *Naquart* promesas al ŝi luksan kaleŝon kaj ĉion, kion ŝi nur deziras.

La solvo de tiu konflikto estas originala, ĝi baziĝas sur la ruzajo de *Naquart* kaj sur la kontrakto, kiu konsideras ĉefajn interesojn de ĉiuj personoj. Dank'al tiu kontrakto, ĉiuj ekhavis tion, kion ili volis.

Interesa trajto de lia verkmetodo: *Dancourt* ŝatas precizajn ciferojn, kiam temas pri havaĵo de liaj herooj aŭ pri la prezoj de venditaj aŭ aĉetitaj postenoj kaj titoloj. - Tio montras, ke, malgraŭ la strebo al altaj sociaj tavoloj, la mono ludas ĉiam pli kaj pli grandan rolon en la franca socio de tiu epoko, la pozicioj de burĝaro plifirmiĝas.

En sia komedio *Dancourt* pentras epizodojn el la franca vivo ĉe la limo de du jarcentoj. Li montras karakterajn trajtojn de tiu epoko: aĉeto-vendo de postenoj, plifortigo de la burĝaro, retakso de multaj nobelaj vivprincipoj, - kio respeguliĝas en la persono de grafo (li volas okupiĝi pri aferoj por esti sendependa de burĝoj).

Kiel bone rimarkis franca literaturkritikisto *A. Blanc* (2): "La socio de la XVII jarcento, kontraŭe al la nuna socio, ne miksis la nociojn de nobeleco kaj riĉeco: la riĉeco ne donas nobelan devenon, sed permesas akiri ĝin. Kaj, ĉar la vantemo estas unu el la



plej fortaj homaj pasioj, la persista strebo al nobeleco estas firme ligita kun la pleno de vivplezuroj. Malmultaj estas homoj, aparte inter virinoj, - kiuj kontentiĝas per riĉeco kaj ne strebas al la nobela deveno, al aristokrateco. Tio estas unu el pli bone pentritaj aspektoj de la socia vivo en la teatro de *Dancourt*. ”Kaj, laŭ nia opinio, la komedio ”La aristokrataj burĝinoj” estas plej bona pruvo de tio.

#### Literaturo

(1) *F. Dancourt* ”La aristokrataj burĝinoj”, en *”Répertoire du théâtre français. Comédies”*, vol.10, Paris, MDCCCIV.

(2) *A. Blanc*, *”Dancourt (1661-1725). La comédie française à l’heure du soleil couchant”*, Paris, 1984, p. 255.

#### Adreso de la aŭtorino:

Ljudmila MURSALIJEVA  
Doktorino pri filologio  
Baŝkiria Ŝtata Universitato  
ul. Komarova 26 - 21  
RU 450044 UFA  
RUSLANDO - BAŜKIRIO

## Jules Verne pri la lingvo Esperanto – hungare!

HASZPRA Ottó (HU)

Jules Verne (1828-1905): *Róma ostroma és más elbeszélések* (=Sieĝo de Romo kaj aliaj rakontoj). Unikornis Kiadó, Budapest, 1998. ISBN 963 427 214 2 kaj ISBN 963 427 264 9. Tradukis el la franca hungaren: Miklós Kováts. 228 paĝoj. Prezo en Hungario: 1950 HUF.

Tiu ĉi volumo prezentas tiajn verkojn de Verne, kies manuskriptoj longe kaŝiĝis kaj aperis eĉ en la franca ne pli frue ol en 1993. Troviĝas inter ili unu romanfragmento (feliĉe nefinita, ĉar tre malbona) el 1847 (kiam Verne estis nur 19-jara), kvar tute pretaj, ne pli ol meznivelaj, ne sciencrilataj rakontoj el 1865, kaj – kio estas sensacia – lia lasta literatura kreaĵo: la unuaj – tre multpromesaj – 45 paĝoj de la romano „*A tanulmányút*“ (La esplorvojaĝo), kiun pro sia morto (en 1905) la aŭtoro jam ne povis fini.

Tiu ĉi viglastila fragmento sugestas, ke temas pri interesa romano de politika, scienca kaj aventura karaktero, planita por ĉ. 500-600 paĝoj, pri studvojaĝo de du francaj parlamentanoj, kiuj volas traveturi kaj esplori la tutan francan Kongolandon por studi, ĉu la kondiĉoj en tiu granda kolonio estas jam maturaj por demokratia elektado de novaj anoj al la franca parlamento (kontraŭ kio cetere ili havis antaŭjuĝojn, ja ili volis nur ŝtatokoste veturadi kaj akiri famon). Ili aliĝis al jam preparita ekspedicio.

Tiu ekspedicio havis tri ĉefajn gvidantojn-fakulojn nomumitajn de la komercministro: junan, sed tre spertan inĝenieron de la franca Oficejo pri Pontoj kaj Ŝoseoj (la responsan gvidanton de la ekspedicio), la eĉ pli junan ĉefsekretarion de la franca Geografia Societo (kun ĉiuj eblaj scioj pri la vizitota regiono), fine membron de la franca Touring Club, sampersono delegiton de la Internacia Esperanto-Societo (interesita pri la disvastiĝo de Esperanto en tuta Mez-Afriko, do poste ankaŭ en la belga Kongolando). Tiuj tri homoj fakte havis la necesajn konojn kaj korpajn, mensajn kaj